

TEA-BULTENO

16^A JARO

JANUARO - FEBRUARO 2013

NUMEROJ 1-2

Neniam uzu dirmanieron alilingvan, sciencan terminon aŭ malfacilan vorton, se oni ja disponas propralingve samsignifan ordinaran vorton.
George Orwell, brita ĵurnalisto k verkisto (1903-1950)

Kara Legantaro!

Bonan kaj prosperan 2013-an jaron tutkore mi deziras al vi ĉiuj!

Plua jaro foriĝis, pli-malpli brue enpaŝis la tute nova! Kion ĝi alportos (aŭ ne estas aŭgustoj, kaj verdire plibonas ne antaŭscii pri la estonteco. Ni akceptu la venontaĵojn per firma sinteno, konsciaj pri propraj valoro kaj forto superi ĉiajn malfacilaĵojn, per granda dozo da honesteco kaj bona volo, aldonante kelkajn gutojn da prudento kaj kuleregon da fido al aliaj homoj. Ni havu malfermitan koron, kiu plej efike nin gvidos sur la ĝusta vojo, sur la vojo de solidareco, de kunlaboremo, de reciproka respekto. Ni aliĝu al kiuj havas niajn samajn sentojn, kiuj deziras kunkonstrui novan mondon, por la tuta homaro kaj ĉefe por la ontaj generacioj, mondon kie vivo estos pli vivinda, kie finfine ĉiu el ni protektos naturon kaj medion kaj plene engaĝiĝos por defendi ĉies rajtojn, kie finfine paco regos kaj bonaj vivkondiĉoj ekestos por ĉiuj. Jes, bela utopio, ĉu ne?

Ankaŭ nia Zamenhof estis taksita kaj priridita kiel "utopiisto" pro sia neniam kaj neniel realigebla projekto. Je certa momento de sia vivo li elmetis ĉi demandon: ĉu efektive ni laboras por ia utopio? Post 125 jaroj de publikigo de la unua libro pri la Lingvo Internacia ni povas fiere respondi, ke ne, kara Majstro, vi ne laboris por ia utopio, vi laboris por io reala, kiu de tiom da jaroj servas kiel senpera inter-

komprenilo inter centoj, miloj da homoj, kiu interkontaktigis kulturojn tra ĉiuj kontinentoj, kiu forfaligis la lingvobarojn, kiu interfratigis kaj amikigis homojn, tiujn komprenintajn ke valoras la peno ĝin lerni. Kiu ĝin studis, tiu pli ricevis ol donis, kaj tio kion oni ricevis tute ne estas mezurebla per la normalaj iloj je nia dispono. Pli ol oro tio valoras! Tial neniam ni ĉesu revii kaj esperi, ekzistas - almenaŭ ĝis nun! - nenia leĝo kiu tion malpermesas. Ni daŭrigu nian agadon per Esperanto kaj por Esperanto cele al pli bona komuna estonteco!

Kaj nun bonvolu legi ĉi leteron, kiun nia Zamenhof skribis en la 2-a novembra numero de "La Esperantisto", (1889) en la rubriko "Respondo al la amikoj":


«Al S-ro M. en G. - Via letero estas subskribita: "Unu el la plej varmaj amikoj de la lingvo Esperanto!" Mi efektive memoras, ke de tempo al tempo vi sendas al mi leterojn kun demandoj pri la irado de la afero; sed neniam ankoraŭ Vi skribis al mi kion Vi mem faris por nia afero. Varma amiko de nia afero povas sin nomi ne tiu kiu ĉiam demandas, sed nur tiu kiu laboras por nia afero kaj vastigas ĝin. Anstataŭ demandi min ĉiumonate "kio estis farita" Vi devas en la fino de ĉiu monato demandi Vin mem: "kion mi faris por nia afero en la pasinta monato?"»

L. Z-f

Denove al vi ĉiuj Bonan Novan Jaron kaj sukcesan laboradon por nia Afero!

Via redaktanto

Laste trovitaj!



Traserĉe en delonge neesplorataj skatoloj, en kiuj kuŝas pluraj ordigendaĵoj, hazarde falis en miajn manojn la jena brunkolora karto, reklamanta la katolikan revuon, organon de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Stranga koincido, ĉar - la antaŭan Kristnaskan tagon - mi estis aŭskultinta la Papon, eldiri siajn bondezirojn en 65 lingvoj, inter kiuj ankaŭ nia Esperanto: «Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron!» kaj

la eltrovo de tiu karto puŝis min serĉi iom pli da informoj pri ESPERO KATOLIKA. Pri la karto ioma pri-skribo troveblas en la 1-a informoriĉa kajero, 84-paĝa, "Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj", verkita de Jean Amouroux kaj eldonita

de FRANCA ESPERANTISTO en 1999. La karto estis farita en 1928, okaze de la 25-a datreveno de la revuo: sur ĝi la devizo: «Unu ŝafejo kaj unu paŝtisto» kaj la adreso de F-ino Marie Larroche, kiu estis, en jaroj 1934-35, vicprezidanto de IKUE.

El la tre bone zorgita retpaĝaro de IKUE, akurate ĝisdata, eblas ĉerpi abundegon da informoj pri la katolikaj movado kaj revuo.

La unua ekzemplero de Espero Katolika estis eldonita duone de novembro 1903 en Tours, Francujo, kaj tial ĝi estas la plej malnova Esperanto-revuo ĝis nun ankoraŭ aperanta. Ĝi antaŭis la fondon de IKUE, okazonta en 1910 en Parizo. Direktoro de EK estis la franca Pastro Émile Peltier, kiu esperantistiĝis en 1901. En 1905, dum la Bulonja UK, li faris la unuan esperantistan Di-servon, sed ne povis prediki Esperante, pro malpermeso de la loka epis-kopo. La postan jaron, danke al perado de Monsinjoro Giambene, Papo Pio la 10-a transdonis letere Sian Apostolan Benon, tiel ke septembre 1906 li povis prediki en nia lingvo.

Sekvas je p. 2-a

En la 1-a numero de EK legeblas i.a. el la plumo de ties redaktoro, Henri Auroux, tre mensotikla mesaĝo "Vekiĝu, esperantistoj!", kies enhavo ege aktualas. El ĝi kelkaj pensigaj frazoj:

«Antaŭ unu jaro, multe babiladis Esperantistaj gazetoj pri l' neŭtraleco de l' Internacia lingvo. Kaj, efektive, tiu lingvo estas tiel neŭtrala, ke neniu ĝin uzas, ke per ĝi nenio estas dirata, ke l' Esperantistoj parolas nur pri Esperanto. [...] Neŭtraleco povas esti komprenata dumaniere: Tiu estas neŭtrala, kiu nenion diras, kontentiĝas kanti pri birdetoj kaj floroj, pri malnovaj legendoj aŭ vojaĝaj aventuroj; ankaŭ neŭtrala tiu, kiu, dirante ĉion, kion li pensas permesas al ceteraj diri ĉion, kion ili volas: tiele ĉi neŭtralos Espero Katolika. Ni tre bone ŝatas, ke Socialistoj, Hebreoj, Protestantoj, Framasonoj kreu revuojn, ke fondiĝu Espero Socialista, Espero Hebrea, Espero Protestanta, Espero Framasona; ni eĉ iros pluen: ni gastame malfermos niajn paĝojn al ĉiuj: ni ne kredas posedi la sciencan universalan, kaj tre facile almetas, ke homoj, kies religia penso ne tute similas al la nia, povas instrui nin pri multaj aferoj. [...]

Ni penadis efektiviĝi kiel eble plejan elastecon. Ĉiu aboninto, kia ajn estas lia religio, lia politiko, povos verki artikolon pri kia ajn objekto, literature, filozofie, historie, k.t.p., elmeti kian ajn opinion; nur du kondiĉoj postulataj estos: klara stilo, ĝentileco.[...] Al ni do venu ili, kiuj, ĝis nun timemaj, ne kuraĝis esprimi siajn ideojn; ili ne turmentiĝu pri la gramatiko, pri la korekteco de siaj frazoj; ili nur penadu laŭvere vivi, laŭvive pensi, laŭpense, klare, kompreneble verki [...]; se iafoje glitos en nian revuon ortografiaj eraroj, eble instruistoj, lernejestroj, mezuloj, homoj pli zamenhofanoj ol Zamenhof mem kriegos; aliaj komprenos ke bona penso, eldirita bone, multe pli valoras ol ortografio korekta.»

Tra la mondo...

Rotterdamo - UEA mendis alian poŝtmarkon! Bildo de tiu aperinta okaze de la Malferma Tago, en la pasinta novembro, estas la kovrilo de la Unua Libro kun, dekstraflanke, la nederlandlingva teksto *Eerste leerboek Esperanto 1887-2012* (tio estas 'unua lernolibro de Esperanto 1887-2012'). Ĝi validas por afranki normalan enlandan sendaĵon. La poŝtmarko estas aĉetebla en blokoj de 10 ekzempleroj; unu bloko kostas 6 eŭrojn (aldonendas la elsendokosto). Mendebila ĉe la Libroservo de UEA.

Buenos Aires gastigos la 99^{an} Universalan Kongreson en 2014. La estraro de UEA elektis la ĉefurbon el inter tri argentinaj urboj, kun kies organizaj kondiĉoj la kongresa respondeculo de UEA Clay Magalhães antaŭe konatiĝis surloke. Argentino gastigos UK-n por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradicion. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1941.

La plej granda Esperanto-libro! Kiel rezulto de 20-jara sizifa laboro de d-ro Máthé Árpád, aperis en Budapeŝto "Bibliografio de Esperantaj period-




Ne bezonatas komentoj, ĉu ne?

Kaj nun rigardu ĉi alian poŝtkarton, eldonitan unuajardeke de 1900, kiu okulfrape evidentigas, ke malsanoj aŭ malvirtoj malfacile elradikigeblas: alkoholismo ekzistis iam, nun kaj bedaŭrinde ekzistos ankaŭ estonte, malgraŭ ke en niaj socioj oni strebas kontraŭstari tiun fenomenon per plej diversaj rimedoj, sed rezultoj ne estas tiom bonesperigaj. En la pasinta jarcento la tipa alkoholisto aĝis inter 40-50 jaroj, hodiaŭ malaltiĝis la aĝa averaĝo, tre draste, tiom ke granda atento estas direktata al tiuj gejunuloj kiuj, stulte kaj senpripense, endanĝerigas sian tutan estontecon pro malmodera alkohola konsumado.

La supra bildo estas aparte ŝoka, skua, kruda kaj ĝuste tia estis la intenco de 'La Croix Bleue', ankoraŭ nuntempe aganta en Parizo: timigi, terurigi homojn per signifoplena, tre klara kaj senvuala prezento de la riskoj pro alkohola trinkegado. La sama desegnaĵo estis uzita afiŝformate de 'Internacia Propagando Kontraŭ-Alkohola', en Vieno, kaj estis vendita ĉe tiurbaj librejoj. Dorse de la karto, jena averta: «Alkoholo ne estas nacia nek klerika, sed venena» kaj informo pri kontakto, en Vieno, kun la Kontraŭalkohola Centro plus du adresoj de senalkoholaj restoracioj. Esperanto servis ankaŭ al tio!

Elda



aĝoj". La datumbaza kolekto listigas 14.173 Esperanto-gazetojn, revuojn kaj aliajn periodaĵojn ekde 1887 ĝis hodiaŭ, kun iliaj nomoj, eldonjaroj, redaktoroj, ĉefaj sciindaĵoj, ktp! Ŝajne la libro - aperinta antaŭ 2 jaroj - estas unu el la plej "grandaj" Esperantaj libroj: ĝi pezas 3,3 kilogramojn, kaj enhavas 1155 paĝojn en formato A4! D-ro Máthé Árpád estas kontaktable pere de oficejo@eventoj.hu

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Ankoraŭ longas la listo de demandoj pri specifaĵoj de Triesto, do daŭre vi cerbumados ankaŭ dum ĉi tuta jaro! Bonan amuziĝon!

- 1) Kian apartaĵon havas strato *Alberto Nota*, situanta inter strato *Carducci* kaj korso *Umberto Saba*?
- 2) Kio kuŝas komplete enterigita, jam forgesita, en tiu preciza punkto kie nun troviĝas la fontano antaŭ la preĝejo Sankta Antono la Nova?
- 3) Kiu estas la origino de la nomo "Bora"?
- 4) Kio estas kaj, ĉefe, kie troviĝas la galerio de rivereto *Corgnoletto* (elp. Kørnjoletto)?
- 5) Se vi vizitas la urban Naturhistorian Muzeon en strato *Tominz* kaj demandas pri "Antonio", kiun oni prezentas al vi?

Kontrolu la ĝustecon de viaj respondoj je paĝo 5^a.

Jen dua fabelo de Gianni Rodari, la itala pedagogo kiu verkis por geinfanoj.

Iu estaĵeto ekhavis vizion pri la vivo tute novecan, malordinaran, ekster tiuj mensaj skemoj, firme fiksitaj ofte de timo elsalti el la reloj de rutinaj kutimoj, alfronti nekonatajn situaciojn aŭ nur la prijuĝon de la aliaj. Iafoje la plej grandaj ŝanĝoj komenciĝas per intuicio hazarda aŭ pripensita. Neniu homo havas precizan, antaŭdestinitan, absolute neŝanĝeblan rolon en sia vivo: tial foje oni devas havi la kuraĝon modifi propran estontecon, kiam oni eksentas tiun bezonon, kaj sekvi sian intuicion! Sen la laboro de pioniroj, je la komenco miskomprenataj, apartigataj, mokataj, kaj nur poste, eĉ tro ... poste, fine laŭdegataj, aplaŭdataj, ne ekzistus progreso por la homaro: do, samkiel nia kankreto, ni ne timu iri nian vojon poresperantan, sekvante nian ideon kaj ĝin proponante al la homaro - ĉiam ekzistas ia eblo ŝanĝi la estontecon de l' mondo, tial "bonan kunvojaĝon"!

LA JUNA KANKRO

de Gianni Rodari



Demandis sin juna kankro: «Kial en mia familio ĉiuj retropaŝas? Mi volas lerni paŝi antaŭen, kiel la ranoj, kaj prenu min la diablo se mi ne kapablos tion fari».

Li komencis kaŝe ekzerci sin, inter la ŝtonoj de la naskiĝloka rivereto, kaj dum la unuaj tagoj la tasko estis treege laciga por li. Kontraŭ ĉio li puŝiĝis, kontuzis sian karapacon kaj surtretis kruron per la alia. Sed iom post iom la afero pliboniĝis, ĉar ĉio estas lernebla, per persista volo.

Kiam li sentis sin tute sekura, li prezentiĝis al sia familio kaj diris: «Nu, rigardu!». Kaj sin elmontris per belega kuradeto antaŭen. «Ho, filo mia - esploris la patrino - ĉu ci frenezigiĝis? Reprudentiĝu, paŝu kiel cia patro kaj cia patrino instruis al ci, paŝu kiel ciam fratoj, kiuj ege amas cin». Sed liaj fra-toj ja mokridaĉadis lin.

Dum iom da tempo lin rigardis la patro, severmienne, kaj fine, ekdiris: «Sufiĉas! Se ci volas resti kune kun ni, paŝu kiel la aliaj kankroj. Se ci volas agi laŭ via kapo, la rivereto grandas: iru kaj ne plu revenu».

La brava kankreto ja amis sian familion, sed estis tro memfida, por havi ian ajn malcertecon: li cirkaŭbrakis sian patrinon, salutis la patron kaj la fra-tojn kaj ekmarŝis al la mondo.

Lia paŝado tuj ek surprizis grupeton da ranoj, kiuj, kiel veraj amikinoj, estis kunvenantaj ĉirkaŭ nimfe-
ofolio por iomete klaĉadi.

«La mondo iras al tute mala direkto - diris la unua - rigardu tiun kankron kaj, se vi povas, malpravigu min». «Neniu plu respektas iun ajn» diris la alia. «Huj do, huj do!» ekkriis la tria. Sed la kankreto pluiris rekten, ja precize tiel, laŭ sia vojo.

Subite aŭdiĝis alvoko far maljuna kankrego, melankolie rigardanta, kiu tute sola staris ĉe ŝtono.

«Bonan tagon» diris la juna kankro. La maljunulo longatempe observis lin, kaj poste diris: «Kion ci pensas fari? Ankaŭ mi, je mia junaĝo, opiniis oportune instrui la kankrojn paŝi antaŭen. Do, jen kion mi gajnis: mi vivas tute sola kaj ĉiuj prefere hakis sian langon, ol alparoli min. Aŭskultu min, ĝis an-

Mirindaĵo ĉe televido

Antaŭ kelkaj tagoj, spektante televidon, hazarde mi kaptis dum teleĵurnalo interesan kaj tute novan informon, se paroli pri italaj novaĵoj.

Vidalvide de *Riccione*, ĉe la norda Adriatika Riviero - dumsomere fama libertempa kaj marbana loko - konstruo de tre vasta artefarita insulo estas planita, cele al turisma servo: haveno por sportaj boatoj kun koncernaj mekanika helpstacio, restadomoj, restoracioj kaj kromaj amuzejoj.

Tia la fakto.

Tujtuje revenis al mia memoro alia evento, bone konata ĉe la esperantistaro: la "Insulo de la Rozoj", starigita antaŭ 44 jaroj, proksimume ĉe la sama loko. Kaj, surprize, aperis akurate sur la ekrano pecoj de tiutempaj filmraportaĵoj pri la epizodo - neforgesebla en historio de Esperanto - kun precizaj informoj pri la tiama evento. Videblis eĉ la al-borda atako de la militistaj motorboatoj.

Ĉu vi memoras? Mi jam raportis pri tiu afero en la TEA-Bulteno je septembro 2009.

Inĝ-ro Giorgio Rosa el Bolonjo konstruigis, en la jaro 1968, platformon de ferbetono, 400 kvadratajn metrojn vastan, lokigitan je 7 mejloj for de la marbordo, ekstere de la italaj teritoriaj akvoj, kiun



subtenis naŭ ŝtaltoleroj, per betono plenigitaj ĝis la marfundo je 14 metroj. Tie estis proklamita la libera respubliko "Insulo de la Rozoj", kun ministraro, flago, propra mono - mills - kaj oni elektis Esperanton kiel oficialan lingvon, kiu aperis eĉ en la teksto de poŝtmarkoj, sinsekve trifoje emisiitaj.

Tiu sendependa respubliko eĉ akiris favoran verdikton ĉe la Internacia Kortumo de L'Aja, tiel fariĝante diplomata afero. Sed la itala registaro tute malakceptis starigon de tiu libera teritorio antaŭ propra ĉemara bordo: post 55 tagoj ekde la sendependiĝo, militistaro okupis la "Insulo"-n, kaj, sekvajare, ĝin sinkigis per eksploda manovro. Kromaj informoj troviĝas en la 130-a paĝo de *L'esperanto in Emilia-Romagna*, verko de Luigi Tadolini, Bolonjo 1989.

Do, ŝajne, la ideo de inĝ-ro Rosa ne estis tute "stranga": ĝi estis NUR duonjarcente antaŭtempa, SED malkaŝe fruktodona.

Ĉu ankaŭ nia lingvo internacia simile kondutos? Esperinde.

Viglo

koraŭ estas tempo: submetiĝu al konduto de la aliaj kaj, estontece, ci estos danka al mi pro tiu ĉi konsilo».

La juna kankro ne sciis, kion respondi kaj, do, preferis silentis. Sed ene de si mem li pensis: «Mi ja pravas». Do, li la oldulon afable salutis kaj forpafiĝis.

Ĉu malproksimen li iros? Ĉu li sukcesos? Ĉu li forbalaos ĉiujn maljustaĵojn de la mondo? Tion ni ne scias, ĉar li ankoraŭ nun estas daŭre marŝanta, kuraĝe kaj obstine kiel en la unua tago. Ni povas nur al li tutkore bondeziri:

«Bonan vojaĝon»!

Tradukis Viglo

PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Ankaŭ ĉijare plu daŭras la senfina provizado de nemalhaveblaj vortoj fare de nia amiko VIGLO
Ĉu ĝi utilas aŭ mal-? Bv. certigi pri tio la redaktanton. Dankon.*

Leporo	longorela ronĝulo	Magnezo	(Ke) oksido de magnezio
Lepro	(Md) infekta haŭtmalsano	Majstro	spertulo; granda artisto
Letero	skribaĵo	Mastro	ordonrajta posedanto de domo, bieno ks; estro
Litero	skribita signo de voĉsono		
Licencio	universitata rango	Makaronio	(Ku) tubforma farunpastro
Licenco *	permeso de registaro al ŝtatano plenumi difinitan socian agadon; malobeo al poezia regulo	Makarono	(Ku) frandaĵo el migdaloj, sukero k ovoblanko
Liceno	(Zo) g. (<i>Lycaena</i> k parencaj) de ne-grandaj tagpapilioj	Makro-	prefikso en sciencaj nomoj
Likeno	(Bo) fungo apartenanta al biologia grupo (<i>Lichenes</i>) simbiozanta kun algoj	Makropo	(Zo) g. (<i>Macropus</i>) de kanguruoj
Linĉo	neleĝa punmortigo	Maleo *	(Te) ligna dukapa martelo; (An) orela osteto; (Md) infekta malsano de la ĉevalo
Linko	(Zo) g. (<i>Lynx</i>) de rabobestoj	Malo	kontraŭo
Liniaro	(Mu) aro de kvin horizontalaj linioj cele al skribado de notoj	Mandareno	iama ĉina ŝtatfunkciulo
Liniilo	ilo por streki liniojn	Mandarinio	oranĝeto, frukto de arbo (<i>Citrus nobilis</i>) el SE Azio
Logilo	logaĵo	Mantelo	(Vs) vasta longa senmanika vesto
Logo *	tio kio logas; (Mr) instrumento por mezuri ŝiprapidecon	Mantilo	(Vs) hispana kaptuko
Loĝo	ago de kiu loĝas	Markezo	(Ar) alero ŝirmanta kontraŭ sunaj radioj
Loĝio *	apartigita loko en teatro; domo de framasona grupo	Markizo	rango de nobelo
Lucerno	pendanta lampo	Maso	nedifinita kvanto de materio
Luzerno	(Bo) sp. de furaĝplanto (<i>Medicago sativa</i>)	Amaso	granda senorda kvanto
Lukano	(Zo) g. (<i>Lucanus</i>) de granda insekto el koleopteroj; cervoskarabo	Matraco	granda, plata dormokuseno
Luko	lumaperturo	Matraso	(Ke) vitra longakola ventra vaso
Lukumo	turka frandaĵo el sukerita amelfaruno	Matrico	(Te) muldilo por reprodukti pecojn per stampado aŭ fandado
Lumbago	lumbodoloro, lumbalgio	Patrico *	(Te) ŝtala peco gravurita reliefe por pretigi matricojn; garantia signo stampita sur multevaloraj metaloj
Lumbajo	(Zo) bestoparto destinita por kuirado	Melo	(Zo) unuspecia g. (<i>Meles meles</i>) de mamulaj rabobestoj
Lupeo	(Te) konvekso lenso, grandiganta	Melolonto	(Zo) g. (<i>Melolontha</i>) de insektoj mal-utilaj al kultivplantoj; majskarabo
Lupeno	(Bo) g. (<i>Lupinus</i> el fabacoj) de legumenco	Melono	(Bo) sp. de kukumiso (<i>Cucumis melo</i>) el U Afriko
Lupo	(Zo) sp. (<i>Canis lupus</i>) de sovaĝa rabobesto	Meloo	(Zo) g. (<i>Meloe</i>) de koleopteroj
Lupolo	(Bo) sp. de humulo (<i>Humulus lupulus</i>), herbo utiligata medicine k precipe en bierofabrikado	Mento	(Bo) g. (<i>Mentha</i> el lamiacoj) de herbo, bonodora, saniga
Lupuso	(Md) kronika haŭtmalsano de tuberkuloza naturo	Mentolo	(Ke) monoterpena alkoholo el mentoleo, uzata en farmacio
Lutro	(Zo) g. (<i>Lutra</i>) de mamuloj	Mentono	(An) parto de vizaĝo
Lutreolo	(Zo) sp. de mustelo (<i>Mustela nutreola</i>)	Mentoro	saĝa konsilanto
Maco	plata kuko manĝata de Hebreoj dum Paska tempo	Meso-	(Md) prefikso por nomoj de peritonea refaldo
Maĉi	dispremi en la buŝo per dentoj	Meso	diservo katolika
Maĉo	= matĉo	Messo	lorena urbo (<i>Metz</i>)
Maŝo	nodo en trikita teksaĵo	Mezo	loko egaldistanca de du ekstretoj
Meĉo	bruligebla ŝnurospeco en lampo aŭ por eksplodigi pulvon	Metro	(Te) mezur(il)o
Magazeno *	granda vendejo diversvara; ejo kie konserviĝas provizaĵoj	Metroo	(Te) subtera rapida fervojo
Magazino	perioda ilustrita revuo	Mielo	(Ku) sukera nutraĵo produkto de abeloj
Magnezio	(Ke) elemento (<i>Mg</i>)	Mjelo	(Md) spina parto de nerva sistemo
Magnezito	(Ge) mineralo, erco de magnezio	Miliono	(Mt) mil miloj
		Milionono	1/1 000 000
		Milono	1/1 000

* Malofta ekzemplo de "Homonomoj" en esperanto.

Fajra suno, strandoj sablaj, bluega ĉielo kaj varmega etoso estas la ĉefaj ingrediencoj de Internacia Esperanto-Renkontiĝo KER 2013

13-17 marto 2013

Kie? En la belega feriejo Los Cocos (La kokosoj), troviĝanta sur la vojo de Havano al Varadero, ĉe plaĝo Jibacoa, ideala loko por junularo kaj familioj.



Ĝiaj komfortaj ĉambroj, senri-proĉa kafeteria kaj restoracia servado, naĝejo, diversaj ekskurseblecoj kaj multo alia pliriĉigos la intensan programon por praktiki la lingvon, ĉio ĉi en rava, ĉemara naturo.

Kiom? La aliĝkotizo, 150 eŭroj por eksterlandanoj, inkluzivas:

- 1) veturadon de Havano al Feriejo Los Cocos kaj reveno;
- 2) loĝadon dum 5 tagoj (4 tranoktoj) en 2-litaj ĉambroj, kun klimatizilo, televido, privataj neces-ejo kaj duŝejo;
- 3) maten-, tag- kaj vespermanĝojn.

Kiel? Eblas pagi surloke la aliĝkotizon. Por pliaj detaloj informiĝu ĉe KEA: info@esperanto.co.cu aŭ vizitu ties ttt-ejon: www.esperanto.cult.cu.

Nur kelkaj programeroj: ekskursoj, ludoj, filmoj, dancokursoj, seminarioj pri informado, financo, junularo, sportaj aranĝoj kiaj retpilko, piedpilko, pedaloata konkurso, koncertoj kaj teatraĵoj ktp.

Nepre profitenda okazo pasigi mirindajn feriojn en varmega kunestado kun la vigla, gaja, muzikema kuba esperantistaro!

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) Temas pri strato sen pordoj ĉe la domoj kaj sekve ne eblas sonorigi ... iun ajn sonorilon!
- 2) En 1917 ankrigis ĉe la Granda Kanalo du torpedosipoj de la Aŭstria Mara Armeo. Postmilito restis nur unu, kies motoro estis tute difektita. Pro nekonataj kialoj ĝi restadis tie dum pluraj jaroj, kio feliĉigis la triestajn knabojn kiuj ludadis ofte sur ĝi. Je la unuaj jaroj de 1930 estis enterigita la unua parto de la kanalo kaj la torpedosipo, sena je laŭleĝa posedanto, forlasita kaj ... forgesita, renversiĝis flanken: tiam ĝi estis surŝutita per la rubaĵoj de malkonstruitaj domoj de la malnova urba parto.
- 3) "Bora" devenas el la latina vorto "boreas", (greke "boréas"), impeta vento blovanta de oriento-nord-oriento al la triesta golfo.
- 4) Temas pri rivereto kiu fontas ĉe la deklivoj de *Montebello* kaj fluas parte supraĵe, antaŭ ol eniri galerion sub strato *Costalunga* (elp. Kostalunga). Tiu galerio, longa 700 metrojn, etendiĝas sub la tombejo *Sant'Anna*.
- 5) *Antonio* estas la plej granda kaj kompleta dinosaŭro (anasbeka hadrosaŭro) ĝis nun eltrovita en Italio, longa 4 metrojn kaj vivinta antaŭ pli ol 80 milionoj da jaroj.

Solvo de cerbotiklilo



(aperinta en la pasinta TEA-Bulteno). La ensteliĝinta multipliko estas tiu markita per litero **a)**. Ĝi estas la ununura, kies produkto ne entenas la ciferojn **4** kaj **5**. Fakte:

- a) **35 x 22 = 770**
- b) **45 x 12 = 540**
- c) **66 x 9 = 594**
- d) **73 x 8 = 584**
- e) **24 x 19 = 456**

Neniu sendis al mi la respondon, tial mi, tute sola, elmanĝos la bongustan kukon, kiu konsistigas la premion! Meditu, meditu!!!

Januara Programo	
4 vendredo	20h00 - Ordigado en TEA-sidejo
7 lundo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Projektoj por la jaro 2013
8 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
11 vendredo	20h00 - Gramatikaĵoj el "Esperanto" de FEI
15 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
18 vendredo	20h00 - <i>Dante kaj Chekhov en Esperanto</i> - teatraĵo de G. Turone
22 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
25 vendredo	20h00 - <i>Ludovikoj en Brazilo</i> - filmo de Roman Dobrzyński
29 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
Februara Programo	
1 vendredo	20h00 - Fotoj pri Armenio: 3 ^a parto
5 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
6 merkredo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Moresnet, teritorio dediĉita al amikeco
8 vendredo	20h00 - <i>125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun</i> , prelego de prof. H. Tonkin
12 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
15 vendredo	20h00 - Edvige raportas pri Brazilo!
17 dimanĉo	10h00 - Ĝenerala TEA-Asembleo
19 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
22 vendredo	20h00 - Fotoj pri Armenio: 4 ^a parto
23 sabato	Salono Beethoven - Spektaklo kun la 'Gruppo Costumi tradizionali Bisiachi' - Turriaco (horaro fiksota!)
24 dimanĉo	Kunveno: La patrino lingvo en literaturo (loko kaj horaro decidenda)
26 mardo	16h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj

Fontoj de kelkaj artikoloj:

Gazetaraj Komunikoj de UEA; Ret-Info. Por "Laste trovitaj": Vikipedio kaj retpaĝaro de IKUE; "Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj".

El la gazeta kolekto de "La Esperantisto" (1889-1894).

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Retto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/
 Associazioneesperantotriestina - www.esperantotrieste.it
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 17^{an} de februaro 2013 je la 10:00, unua kunvoko, kaj je la 10:30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2011:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*)
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
 - d) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 17^{an} de februaro 2013.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).